

HEJS

BULTENO DE LA HISPANA ESPERANTO - JUNULARA SEKCIO

Nro. 11

Majo 1960




REDAKTORO: Sro. José María Cuñat

Sto. Valseca, 32, 1.º, 2.º Barcelono (*Hispanujo*)



Clisés ROLDAN

Jen la HEJS-anaro de Sabadell (Prov. Barcelona). Meze sidas nia delegito Liberto Puig kun sia fileto Oskaro, eble la plej juna membro de nia asocio. ambaŭflanke de S-ro Puig, aperas Ramón Alberich kaj Esteban Olivé kiuj de nun estas la novaj delegitoj.



ANTAŬEN GEJUNULOJ!

Ekzistas multaj homoj en nia lando, kiuj asertas ke la nuna junularo pensas, sentas kaj agas nur atentante frivolajn aferojn, tiel kiel piedpilkon, kinon, modernan dancon, k.t.p. Tiuj homoj kredas ankaŭ ke la plejparto da junuloj kiuj studas oficiale aŭ libere faras tion pensante nur pri si mem, laŭ siaj propraj kaj egoistaj intereso. Ili kredas ke nia nuna generacio konsistas nur el materialistoj pozitivistoj kaj pesimistoj. Tiamaniere oni konsideras la spiritualismon, optimismon kaj altruismon escepta inter niaj gejunuloj.

Per tiuj ĉi linioj mi intencas pruvi ke ili ne pravas. Estas vero, ke granda parto el nia generacio ne atentis pri la gravaj problemoj kiuj influas nian ĉiutagan vivon, sed ne ĉiuj niaj samaĝuloj agas tiel. Ekzistas aliaj gejunuloj pli multnombraj ol oni supozas, kiuj per siaj tutaj junecaj fortoj kaj vigleco servas al la socia plibonigo kaj celas solvi tiujn sociajn kaj individuajn problemojn, kiuj konstante ĝenas kaj konfuzas nin. Tiuj ĉi junuloj, gvidataj de nobla altruismo, nutras la vicojn de la naskiĝanta Europa Federacio, la Mondoivitana Respubliko, la Georgista Unuiĝo Internacia, la Esperanta Movado kaj ceteraj evoluaj nuntempaj movadoj.

Tiu junularo estas la vera fundamento kiu savos nian okcidentan civilizacion. Ni kiel junaj kaj esperantistoj devas malfermi la okulojn antaŭ la granda misio destinata al ni. Ni devas esti pretaj intelekte kaj morale por kiam ni estos alvokataj al agado, ni servu al la Justeco kaj la Vero. Ni ne devas ligi nin per niaj propraj antaŭjuĝoj. Ni liberigu nin el ili kaj ni estu evoluemaj, akceptante ĉion bonan kaj forĵetante ĉion eraran. Sekve, ni komencu disigi la bonon kaj la malbonon, la veron kaj la malveron. Nur per tiu distingo ni iros firme sur la vojo al socia kaj individua plibonigo.

Kio do estas bona aŭ malbona? Tio kio sin bazas sur la konstantaj leĝoj de la Naturo, sur la justeco, la moralo kaj la racio, tio estas bona. Kio estas kontraŭa al ili, tio estas malbona.

Ekzistas centoj da sistemoj sociaj, politikaj, moralaj kaj filozofaj. Sed, kiuj el ili baziĝas sur tiuj supraĵaj kondiĉoj, nome: naturo, justeco, moralo kaj racio? Jen la problemoj!

Pripensu ĝin juna samideano. En niaj manoj estas la destino de la mondo!

NOTAS DE SECRETARIA

Han efectuado el pago de sus cotizaciones, los siguientes socios: José M^a Buscató, Martin Aranda, Francisco Aliaga, Teresa Sala, Ramón Alberich, Juan Roqueta, José Alboquers y Francisco Mateu.

Nuevos socios: Francisco Mateu, T. Sala y J. Alboquers.

Donativos: Un esperantista, 50 ptas. y S. J. R. 25 ptas. -
Gracias en nombres de HEJS!!

=====

TRIBUNA LIBRE: Vd. tiene la palabra!!

Barcelona "debe" tener su bien surtido Libroservo local, este es un asunto que los dirigentes del Instituto han de solucionar sin que valgan excusas. Hay que acabar con el enojoso problema de tener que escribir, ir al correo, poner un giro, etc, etc, para pedir un libro a Valencia, a la Federación. Vamos! que comprar un libro de Esperanto resulta casi tan difícil - como lograr una audiencia de la Reina de Inglaterra. (J. C. - "Críticon")

Cuando se habla de hacer "algo", una cosa es sacar pegas y dificultades como para rehuir hacer ese "algo" y otra cosa bien distinta es exponer las pegas de hacer la "cosa" según se dice, pero apoyando y sugiriendo que se haga así o asá, - pero que se haga. (J. B. "Yo")

Que nadie se dé por menospreciado; pero dudo que los elementos de HEJS de donde sea, esten mejor organizados y en tan constante convivencia como los de Sabadell y Moyá. Dénse una vueltecita por allí y... verán, verán. O bien borren a los socios de HEJS de dichas poblaciones y veran lo que ocurre. No quiero ni suponerlo!! Datos? Pues he aquí: Reunen más socios Sabadell y Moyá juntos que las demás poblaciones también juntas (exceptuando a Barcelona) o sea, Valencia, Madrid, Bilbao, y demás poblaciones al estilo de Manresa, Tarrasa, Ca bañal, Cheste, etc. Y voy a poner el nombre de los magníficos HEJS-delegitoj de tales poblaciones: LIBERTO PUIG y FRANCISCO PARAREDA. Felicidades amigos!! (El Redactor)

- LA ANTIKVAJ AMERIKAJ CIVILIZACIOJ -

Kiam Kristoforo Kolumbo eltrovis Amerikon, kaj dum la postaj ekspedicioj kiujn Hispanio organizis por konkeri tiujn landojn; surprizis la konkerantojn trovi monumentojn kiuj pruvis ke ekzistis tie, dum pli antikvaj epokoj, vera civilizacio.

Tiu civilizacio, multe antaŭ ol trovi Amerikon, ekzistis precipe en tri malsamaj regionoj; en Meksikio, Kolombio kaj Peruo.

La plej antikvaj amerikaj monumentoj, estas la nomataj "Mounds", kiuj estis konstruitaj per teramasoj starigitaj kiel vera monteto kaj limigitaj de ŝtonaj remparoj kelkkilometraj kiuj rolis kiel perimetro; la planko de tiuj strangaj konstruaĵoj aspektas kiel formo de homa aŭ besta korpo.

Oni ne scias, ĉu tiuj ŝirmitaj montetoj estis fortikaĵoj por rezisti la atakojn de aliaj popoloj, aŭ estis ejoj por konstrui sur ili, urbon aŭ grandan templon.

Ce la elfosaĵoj faritaj tie, oni malkovris diversformatajn vazojn, pipojn, kaj diversajn strangajn armilojn, ĉio, tre bone farita kaj ornamita, pruvante la plej stran gan kaj gravan civilizacion.

Sed kiam la hispanaj konkerintoj demandis ta loĝantojn de tiuj regionoj pri tiu tiel antikva kaj interesa civilizacio, ili povis klarigi nenion pri ĝi, ĉar jam de multaj jaroj perdiĝis la scio pri la deveno.

La arkitekturo "Majao" kiu troviĝas en Meksikio kaj en aliaj centra-amerikaj landoj estas tre belega kaj riĉe ornata; ĝi aspektas kiel tiu de Hindujo, sed estas tre malfacile certigi ĉu vere influis la art-konstruantoj de Hindujo aŭ estas nur simpla koincido, ĉar ambaŭ landoj estas tro malproksimaj unu de la alia por kredi eblan tiun influon.

José M^a Cuñat

TRADUK-ERARO

Malica montriĝis antaŭ nelonge angla elektrona cerbo, kiun oni uzis por tradukaj celoj. La inĝenieroj estis igintaj ĝin traduki jenan frazon el la angla en la rusan lingvon: "For de l'okuloj, for de l'sentoj!". Por kontroli la ĝustecon oni ordonis al la aparato retraduki tiujn vortojn en la anglan. La rezultajo tekstis: "Nevidebla idioto".

- Ni ne komentis - Red.

I N F O R M A C I O N

En el grupo "Lingua Club" de Manresa se han efectuado grabaciones en cinta magnetofónica a fin de efectuar intercambios con otros grupos esperantistas del exterior.

Un grupo de jóvenes manresanos que empezaron a estudiar Esperanto en noviembre del año pasado, se están arreglando los pasaportes, siendo su intención la de tomar parte en el Congreso Nacional Francés de Esperanto que tendrá lugar el próximo mes de julio en Montelímar.

En Sabadell, el día 9 de Abril pasado y en el grupo local de Esperanto, tuvo lugar la proyección de cinco documentales sobre aspectos de Norteamérica, cedidos gentilmente por el consulado de los Estados Unidos en Barcelona. Asistieron unas cincuenta personas, entre ellas la esperantista francesa sino Jeannine Vincent, que pasó la Pascua en aquella ciudad.

También en el local del grupo de Sabadell, tuvo lugar el día 10 de Abril pasado, una audición de dos cintas magnetofónicas que versaron sobre la "Junulara Germana Asocio" y el próximo Congreso Universal de Esperanto a celebrar en Bruselas, e instigando a participar al mismo. Ambas cintas magnetofónicas fueron gentilmente cedidas, por el Sr. Ramón Molera, cef-delegito de U.E.A.

El día 22 del presente mes, llegarán a Barcelona dos samideanos alemanes; serán huéspedes del destacado y activo esperantista José Bienvenido, el cual nos ha informado de que dichos visitantes nos ofrecerán proyecciones de vistas en color, con la consiguiente conferencia. Son varios los grupos que han solicitado se dé en sus locales, por lo menos una de dichas veladas culturales.

La asistencia al próximo Congreso Nacional de Esperanto, a celebrar en Pontevedra, promete ser numerosísima. Se han registrado ya numerosas inscripciones a las caravanas de autocares que partirán de Barcelona, Sabadell, Valencia, etc. etc. La directiva de HEJS estará representada por nuestro vicepresidente, Jordi Gumà, cuya capacidad y arrolladora simpatía, se notarán de cierto.

FRANCIA: En Perpignan, donde sin descanso hace propaganda el samideano René Llech Walter, tienen lugar regularmente cursos de Esperanto en diversas escuelas e institutos.

BRASIL: Los estudiantes de muchos Seminarios para sacerdotes católicos, en el estado de Minas Gerais, estudian con entusiasmo el Esperanto. Se desarrollan cursos con verdadero fervor en los siguientes Seminarios: "Corazón Eucarístico de Jesús" de Caratinga, y Seminario Mayor de Diamantina. Además, en la "Komuna Lernejo de Esperanto" de Sao Paulo, se enseña E. a 240 alumnos de ambos sexos y se edita un boletín propio titulado "La Lampiro".

HOLANDA: El conocido Editor-Redactor de la revista "Heroldo de Esperanto" Sr. Teo Jung, celebra en estos días sus bodas de oro como esperantista, recibiendo por tal motivo numerosísimas felicitaciones. A ellas unimos la nuestra, de corazón y con el deseo de que por muchos años más siga laborando con la misma eficacia que hasta ahora por la difusión del Esperanto.

ESTADOS UNIDOS: En Greenfield, Massachussets, tuvo lugar durante 15 minutos, un programa de televisión dedicado al Esperanto. El locutor intervino al Secretario del grupo local, David C. Garson, acerca de Zamenhof y el movimiento esperantista; luego se trató también el idioma y su gramática y finalmente sobre las publicaciones en Esperanto, libros, revistas, etc. etc.

ALEMANIA: 669 alcaldes de 12 países europeos, (Austria, Bélgica, Inglaterra, Dinamarca, Francia, Alemania, Italia, Grecia, Holanda, Noruega, Suecia y Luxemburgo) han contestado hasta ahora a la encuesta sobre el Esperanto, realizada por una Comisión Internacional de Alcaldes, bajo la iniciativa del de la Ciudad de Mainz, Sr. Franz Stein. De entre ellos, 581 han afirmado que, "El Esperanto, por su facilidad puede ser estudiado en corto tiempo, y por su neutralidad no ofende los sentimientos nacionales de ningún pueblo. Sería la solución del problema lingüístico del mundo". El resultado de la encuesta ha revelado el apoyo al Esperanto por parte de los alcaldes de ciudades importantes según estas cifras: Suecia y Noruega 100%, Inglaterra e Italia 92%, Austria, Alemania y Holanda 75%.

HUMORAĴOJ

INVESTADO. - Jen, sinjoro Holmes havas aŭtomobilon.

- Jes, lia riĉa onklo donacis ĝin al li.

- Sed li asertas, ke li metis sian tutan monon en ĉi-tiun aŭton.

- Jes, li pravus. Li aĉetis per du dolaroj benzinon.

LABORAMO.- Ho, Frederiko, Kial vi aspektas tiel lace kaj malgaje?

- La laborego, amiko, la peza laboro de frua mateno ĝis malfrua nokto!

- Kiel longe vi jam faras tion?

- Morgaŭ mi devos ĝin komenci.....

AGRABLA RPOFESIO. - Vi certe havas malagrablan oficon kiel enkasigisto de ŝuldoj; nenie vi estas bonvena.

- Male, la plej multaj homoj petas min reveni.

=====

GEINSTRUISTA KARAVANETO EN BARCELONO

=====

Estis hazarda koincido ke deko da eksterlandaj geinstruistoj, du anglaj kaj ok francaj, vizitis Barcelonon okaze de inaŭguro de la nova sidejo de "INSTITUTO DE ESPERANTO"; str. Moncada 12 (Ateneo Obrero Barcelonés)

Pro tio oni ĝue akceptis ilin en la menciita institucio. Senbezone diri ke tiu renkontiĝo estis por ĉiuj vera plezuro, ĉar ĝi permesis, ne nur familian interparoladon pri diversaj temoj koncernantaj la Esperanto-instruadon en Francio sed ankaŭ pridiskuti nian universalan movadon.

Honoris nin per sia ĉeesto, gesinjoroj Alberich, kaj D-ro Bremon Masgraŭ, elstaraj esperantistoj katalunaj.

F-ino J. Dedieu, fakdelegitino de U.E.A., flue kaj trafe paralis pri sia pedagogia fako kaj poste respondis plurajn demandojn fare de la ĉeestantaro.

S-ino Lavallegé, aldonis ke Esperanto forte vekas la interenson kaj atenton de la franca junularo, kiu entuziasme lernas kaj studas ĝin.

Resume: bela festeto kiu montris la vigecon de nia loka esperantismo. La geinstruista karavaneto en akompano de kelkaj samideanoj, admiris la urbajn vidindaĵojn kaj ĉefajn monumentojn.

J. Aragay Pujols.

SURIPARISTO, STELISTO DE BICIKLETOJ

Inter centoj da figurantoj kiuj ĉiumatene aliras la italajn filmlaborejojn, malalta kaj malgrasa viro, kun la manoj enpoŝigitaj, esperas akiri rolon.

Ci-tiu viro estis la plej granda kina malkovro de la postmilita tempo, aplaŭdita de la tutmonda ĉeestantaro, ĉefrolulo de la plej mondfama filmo kreita de Vittorio de Sica, "Stelisto de Bicikletoj".

Lamberto Magiorani, vivis kvazaŭ li estus songanta, li atingis la supron de la "sepa arto". Nune, Lamberto nur de tempo al tempo atingas figurantan roleton, tial por vivi, li laboras kiel ŝuriparisto.

En 1948, Lamberto laboras 10 aŭ 12 horojn ĉiutage en gravà entrepreno por armilkonstruado. Li kontrolas fusilajn celfendojn. Li tiam gajnas ĉiunonate 40.000 lirojn, sufiĉa kvanto por zorgi pri sia familio.

Iun vesperon, lia edzino auskultis per radioaparato, "Vittorio de Sica serĉas unu patron kaj unu filon kiuj estu laboristoj, kun nigra hararo kaj meza staturó".

Ŝi ne atendis eĉ momenton; rapide ŝi kun ŝia filo prezentigis antaŭ Vittorio de Sica, kiu rigardinte lin diris al ŝi: -La infano estas tro bela, tial ne seŭgas al mi; sed diru al lia patro ke li venu.-

Lamberto ne volis iri. "Kion diros miaj kunuloj?".

Fine, lia edzino konvinkis lin ke li provu. Post mal-longe li rezultis elektita. Kaj komenciĝis la revo kiu daŭris tri monatojn. Danke la direktadon de Vittorio de Sica la filmo sukcesis. Lamberto atingis mondfamon kaj monon. Sed iun tagon, De Sica vokis lin kaj diris al li, - Lamberto, mi ne kredas ke vi estas bona aktoro. Vi certe bone rolis en ĉi-tiu filmo, ĉar estis via propra vivo tiu kiun vi prezentis. Mi kredas ke vi devas reeniri la uzinon.

La "stelisto de bicikletoj" sekvis lian konsilon sed la uzino post kelkaj jaroj bankro'tis. Lamberto de tiam estis senlaborulo, kompatindulo kiun la vivo senkompate skuetas.

Komprenante sian pozicion, Lamberto malfermis malgrandan ŝuriparistan negocon. Tiamaniere, estis kiel viro kiu ricevis la aplaŭdon de la tutmonda ĉeestantaro, laboras nune kiel ŝuriparisto.

D-RO J. BREMON MASGRAU. MORTIS !!

Sendube la forpaso de D-ro Bremon kaŭzis ĝeneralan surprizon kaj profundan doloron en niaj medioj esperantistaj. Li estis aktiva kaj batalanta samideano. Membro de la "Lingva Komitato" vicprezidanto de la societo "Espero Kataluna; ĉefredaktoro de "Tutmonda Espero"; rimarkinda gramatikisto kaj vortaristo, kaj aŭtoro de diversaj esperantaĵoj. Krom tio, li estis unu el la organizintoj de la Universala Kongreso de Esperanto, en Barcelono la jaron 1909.

Se kiel esperantisto oni admiris lin ĉie, pro lia saĝeco kiel viro, lia denaska ĝentileco, afableco kaj altira simpaticco korrabis nin tute.

Vere lia morto konsistigas nekalkuleblan perdon por nia universala movado.

Ke lia elstara personeco estu por ni ĉiuj imitinda ekzemplo kaj spegulo de grandaj virtoj.

Restu do li pace tia eminenta esperantisto, kaj ricevu lia ĉagrenplena familio, nian plej sinceran kondolencon!

J. Aragay Pujols. (F.D. por Instruado)

INSTITUTO DE ESPERANTO EN BARCELONO

Post longa malaktiveca periodo, ĝi organizos en sia nova sidejo (strato Moncada, 12) je la unua sabato de ĉiu monato, "diskut-rondon". Ĉiam komenciĝos akurate la 20.00an horon, finiĝante je la 21.00a

La ĉefa celo de tiuj babiladoj estas trakti aktualajn temojn pri diversfakaj materialoj (lingvistiko, arto, scienco, kulturo, k.t.p.), per kiuj ni atingos viglan praktikadon de nia esperanta lingvo, kaj kapabligos nin flue paroli, ĉar posedi lingvon ne nur konsistas en funda kono de la gramatiko, s. interparoli pri iu ajn afero aŭ punkto.

Kiuj ne deziros partopreni ĝin, ni petas ilin, ke ili bonvolu kunveni ĉe la apuda ĉambro kie libere povos interbabili kun aliaj samideanoj, tiamaniere, nek ni ĝenos ilin, nek ili maloportunos nin.

=====

Profesoro Collinson diris: "Esperanto kombinas la praktikan facilecon de la angla, la elegantecon de la franca, la ege emocian econ de la germana kaj la melodian belecon de itala lingvoj".